# LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

## MANLIBRO POR KONGRES-ORGANIZANTOJ

1. CELOJ: Havigi al la Lokaj Esperanto-Societoj, potencialaj organizantoj de la Brazilaj Esperanto-Kongresoj, elementojn por faciligi la plenumon de la diversaj organizaj fazoj. Eviti, ke la organizantoj reinventu ĉiufoje la kongreson kun la risko ripeti la samajn erarojn kaj neoportunajn iniciatojn.
2. TASKOJ DE KKS: Oni povus opinii, ke eldono de Kongresa Manlibro, igu superflua la figuron de Konstanta Kongresa Sekretario. Verdire la taskoj de KKS estas esence jenaj:

   a) Kolekti kaj instigi, kun granda antaŭtempo, kandidatigojn por estontaj kongresoj;

   b) Konstati, laŭeble surloke, la plenumon de la esencaj antaŭkondicoj por sukcesa kongreso;

   c) Flegi la kontaktojn inter la estraro de BEL kaj la Loka Kongresa Komitato (LKK).

3. ANTAŬKONGRESAJ PREPAROJ

3.1 ELEKTO DE LA LOKO: La sperto instruas, ke necesas elekti la kongresurbon kun minimuma antaŭtempo de 2-3 jaroj. La elementoj; kiuj kondiĉigas tiun elekton estas:

a) Ekzisto de Loka Esperanto-Societo, aŭ en apuda urbo, kiu pretas transpreni la organizadon;
b) Disponigo de taŭga kongresejo, prefere senpaga kaj apuda al hoteloj, kie ĉiuj kongresaj manifestacioj povu okazi sen disperdigo de la kongresanoj. Ideala kongresejo konsistu el:
1 Salono/Teatro kun kapacito por 500/600 personoj;
2 salonoj por 100/200 personoj;
4 kunven-ĉambroj por 30/50 personoj;
3 ĉambroj por starigo de Sekretariejo - Gazetara Servo kaj deponejo por materialoj;
1 ekspozici-salono por la Libroservo;
1 granda halo por starigo de pluraj giĉetoj kaj spaco por sidi kaj ripozi;
Memserva restoracio je moderaj prezoj;
La kunvenejoj estu oportune akustike izolitaj por eviti bru-interferojn dum la kongresaj laboroj.
c) Se vere ne eblas ke ĉiuj kongres-aranĝoj okazu en la sama loko, oni devas zorgi por ke la distanco inter la diversaj ejoj estu malgranda.
d) Sufiĉa kvanto da divers-kategoriaj hoteloj, utiligeblaj dum la periodo de la kongreso;
e) Favora sinteno de la urbaj instancoj kaj de la lokaj amaskomunikiloj.

3.2 ELEKTO DE LA DATO: Enketo de BEL evidentigis la preferon de la plimulto de la membraro por kongreso dum la feritago Corpus Christi (majo/junio) . Evidente, tiu prefero ne ĉiam koincidas kun la lokaj postuloj de niaj kongres-organizantoj kaj oni devas superi eventualajn problemojn per akurata antaŭtempa programado.

3.3 ELEKTO DE LA TEMO: La temo de la kongreso estas fiksita de BEL interkonsente kun la invitanta organizaĵo. La elekto de la temo dependas de lokaj aŭ naciaj konsideroj kaj povas eventuale ligiĝi al la jaraj temoj de la Unuigintaj Nacioj. Kune kun la temo oni devas tuj pripensi al taŭga(j) oratoro(j), kiuj kompetente enkonduku ĝin dum la kongreso.

3.4 LOKA KONGRESA KOMITATO (LKK): Starigo de agema Loka Organiza Komitato estas esenca premiso por sisteme kontakti publikajn kaj privatajn instancojn cele al havigo de la

necesaj aŭspicioj kaj subvencioj por la sukceso de la kongreso. Ĝia konsisto sekvu laŭeble la indikojn de la Kongresa Regularo.

3.5 GRAVA ATENTIGO POR LA ORGANIZA KOMITATO: Sekve de ĉiu ajn interkonsento kun aŭtoritatuloj; turismaj kaj hotelaj instancoj, entreprenoj k.s., oni petu skriban konfirmon. Se tio ne eblas, LKK mem skribe konfirmu tion kio estis buŝe interkonsentita citante la daton kaj la nomon de la personoj kontaktitaj. NENIEL kontentigu pri buŝaj promesoj, precipe se temas pri disponigo de senpaga kongresejo, senpagaj aŭtobusoj, rabatitaj hotel-tarifoj, ktp., ktp.

3.6 FINANCOJ: La kongresaj kotizoj estas fiksitaj surbaze de la indikoj entenitaj en la Kongresa Regularo, kiu antaŭvidas la diversajn administrajn detalojn. Kutime, la kongresaj kotizoj ne sufiĉas por kovri la elspezojn de la kongreso, precipe kiam la kongresejo ne estas senpaga. Pro tio, antaŭ ol decidi inviti la kongreson, la invitanta organizaĵo esploru la lokajn eblecojn por ricevi subvenciojn. Se estas tre malfacile ricevi monajn subvenciojn de publikaj instancoj, estas tamen eble havigi "servojn" kiel:

a) Teknikaj sekretariejaj helpoj antaŭ kaj dum la kongreso;
b) Presado kaj ekspedo de kongresa materialo: cirkuleroj - afiŝoj - programoj - ktp.
c) Akceptoj por la kongresanoj (ĉe la urbodomo - komercaj kaj turismaj instancoj -ktp);
d) Disponigo de ejoj por kulturaj kaj artaj programoj;
e) Disponigo de aŭtobusoj por transporto en la urbo kaj ekskursoj;
f) Folkloraj kaj muzikaj prezentadoj;
g) Kongresa dokumentujo kun materialo pri la urbo, ktp.

En la budgeto de la kongreso oni nepre antaŭvidu la restad-kostojn de oficialaj oratoroj, kurso-gvidantoj, artistoj, ktp. Kelkfoje, por garantii la ĉeeston de gravaj personecoj de nia movado kaj de profesiaj artistoj, oni devas budĝeti ankaŭ iliajn vetur-kostojn.

3.7 LOĜIGO: LKK povas mem organizi la Loĝigan Servon de la kongreso aŭ doni tiun taskon al Turisma Agentejo. En la unua kazo, per bone pristuditaj interkonsentoj kun la hoteloj, la kongresa kaso povos ĝui makleraĵon kaj la kongresanoj favorajn tarifojn. En la dua kazo, la makleraĵon ricevos la Turisma Agentejo, sed, evidente, LKK havos malpli da organiza laboro kaj zorgoj. Ĉiukaze, estas nepre necese, ke la hoteloj proponitaj al la kongresanoj estu divers-kategoriaj, apudaj al la kongresejo kaj, kio plej gravas, ke Komuna Loĝejo, senpaga aŭ je modera prezo, estu je dispono de la gejunuloj kaj de la kongresanoj kun financaj problemoj.

3.8 INFORMADO:

a) Al la potencialaj kongresanoj: Post la difino de la dato, de la temo, de la Loka Kongresa Komitato kaj de la kotizoj de la kongreso, estas necese dissendi, kiel eble plej baldaŭ, cirkuleron al la membroj de BEL kaj BEJO, al la lokaj Esperanto-Societoj, al la Redakcio de lokaj Esperanto-bultenoj, al la partoprenintoj de antaŭaj kongresoj kaj al la aliĝintoj de korespondaj kursoj, cele al kiel eble plej vasta diskonigo de la evento. En la internacia movado, dissendo de kelkaj allogaj komunikoj al selektita nombro de Esperanto-redakcioj povos notinde faciligi la eventualan partoprenon de alilandaj esperantistoj, kiuj donus la deziratan internacian karakteron al la kongreso.

b) Al gazetoj, radioj. TV-stacioj. Novaj-Agentejoj, ktp.
LKK devas funkciigi Gazetaran Servon, kiu antaŭ la kongreso periode informu la gazetaron kaj radio/TV-staciojn utiligante serion de artikoloj pri Esperanto disponeblaj ĉe BEL. La informado de la amaskomunikiloj okazu prefere per personaj kontaktoj ĉe la diversaj redakcioj utiligante naci-skale la kunlaboron de la Delegita Reto de UEA en diversaj urboj. Depende de la financaj cirkonstancoj, belaspekta invito al la kongreso, vaste dissendita al aŭtoritatuloj, lernejoj, kulturaj asocioj, jurnalistoj, intelektuloj (ĉefe lingvistoj kaj

universitataj profesoroj), parlamentanoj, sindikatoj, ktp. estos taŭga preteksto por atentigi la publikan opinion, ke Esperanto vivas kaj ne estas "mortinta projekto". La Gazetara Servo dum la kongreso, eldonu ĉiutage inform-bultenon kun la resumo de la kongresaj laboroj kaj sendu ĝin al diversaj redakcioj kaj novaĵ-agentejoj. Por la interna informado de la kongresanoj montriĝis utila la ĉiutaga eldono de "Kongresa Ĵurnalo". Tiurilate vidu Aldonon II. Estas ĉiukaze esence, ke ĉe la Gazetara Servo de la kongreso estu je dispono de eventualaj vizitantaj ĵurnalistoj, informa materialo pri Esperanto kaj personoj bone informitaj pri nia movado, kiuj povu doni intervjuojn aŭ kontaktigi la jurnalistojn kun estraranoj de nia movado.

3.9 HONORA KOMITATO: Oni devas rekoni, ke, ekde la naskiĝo de Esperanto, la favoraj sintenoj esprimitaj de gravaj politikistoj, regnestroj kaj reprezentantoj de la monda kulturo neniam estis esencaj por la progreso de la Internacia Lingvo. Pro tio ekzistas kontrastantaj opinioj pri la utileco de la starigo de Honora Komitato, okaze de niaj kongresoj. Tamen, tiuj honoraj komitatoj havus signifon se enkadritaj en strategio de pli longa antaŭvido, nome en la perspektivo "utiligi en la tempo" tiujn aligojn. Ekzemple, se oni rigardas la liston de la Honora Komitato de la 66-a Universala Kongreso de Esperanto en Brasília (1981), oni rimarkas, ke ankoraŭ nun estus prestiĝe por nia movado citi plurajn el tiuj nomoj, kiel subtenantoj de Esperanto. Kompreneble, estus nia tasko, de tempo al tempo, informi tiujn homojn pri la progreso de la Internacia Lingvo, petante samtempe plian kunlaboron kaj subtenon por niaj novaj iniciatoj. Ekzistas ja psikologia mekanismo, kiu instigas homon, kiu iam esprimis favoran sintenon al Esperanto, rekonfirmi tiun sintenon se petite. La aligojn al la Honora Komitato oni povas peti al: Respublika Prezidento - Ministroj - Guberniestroj - Parlamentanoj - Lokaj kaj Regionaj Administrantoj - Personecoj de la Kulturo, Scienco, ktp.

4. KONGRESA PROGRAMO: La baza kongresa programo, starigita laŭ la Kongresa Regularo, antaŭvidas jenajn punktojn:
- Interkona Vespero
- Simpla distra programo evitas enuan vesperon;
- Solena Malfermo kun invito al elstara oratoro, kiu prezentu la kongresan temon;
-Oficiala akcepto kaj komuna foto (laŭeble) post la inaŭguro;
-Debatoj pri la kongresa temo en la daŭro de la kongreso;
-Kunveno de la Federacia Konsilantaro de BEL;
-Asembleo de BEL por prezento de la Jara Raporto kaj elektoj (se necese);
-Kunveno (aŭ Kongreso) de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO);
-Fakaj prelegoj (laŭeble sub formo de Kongresa Universitato);
-Kunvenoj de diversaj Fakaj Asocioj (lau mendo de la interesitoj);
-Arta(j) Vespero(j);
-Infan-kongreseto (laŭeble);
-Konversaciaj Rondoj por komencantoj;
-Esperanto-ekzamenoj organizitaj de ILEI;
-Solena Fermo kun eventuala fina rezolucio.

4.1 FLANKAJ AKTIVECOJ (laŭ la eblecoj):
- Surstrata manifestacio;
- Ekspozicio;
- Inaŭguro de Strato/Monumento;
- Debato por ne-esperantista publiko;
- Religiaj ceremonioj en Esperanto;
- Laŭokaza poŝtmarko aŭ poŝta stampo;
- Aŭkcio;
- Surstrata koncerto;
- ktp. Ktp.

5. DIVERSAĴOJ

5.1 INFORMOJ AL LA ALIĜINTOJ: Se pro organizaj kialoj ne eblas dissendi al la aliĝintoj la definitivan programon de la kongreso antaŭ ilia alveno, estas tamen necese ke ĉiuj estu fruatempe informitaj pri la loko de la kongresejo, pri la situo de la hoteloj kaj pri aliaj utilaj detaloj. Diskonigo de simpla mapo "kiel atingi la kongresejon" evitas sencelan vagadon tra la kongres-urbo, de tiuj homoj, kiuj ne konas ĝin.

5.2 AKCEPTO ĈE STACIDOMOJ KAJ FLUG-HAVENO: Depende de la grandeco de la kongres-urbo kaj por faciligi la alvenon de tiuj kongresanoj (precipe maljunaj), kiuj ne konas la urbon, estas konsilinde organizi transportservon de la stacidomoj/flughaveno al la kongresejo, kontraŭ pago kaj antaŭa interkonsento pri la alven-horo.

5.3 PREPARO DE LA INAŬGURA SALONO: Bazaj elementoj por digna inaŭguro estas:
-Granda ŝildo malantaŭ la podio kun nomo, numero kaj temo de la kongreso;
-Esperanto-flago kun verda stelo;
-Longa tablo, kun antaŭe listigita kaj ĉetabliĝinta personaro je almenaŭ 10 sidlokoj kaj flanka pupitro;
-Minimume tri mikrofonoj: 2 por la prezidanta tablo kaj 1 por la pupitro. (Nepre garantii la ĉeeston, dum la solenaĵo, de teknikisto por mikrofonoj, por eviti malagrablajn paneojn);
-Necesaj ekipaĵoj por eventuala muzika paŭzo aŭ ĥor-prezentado.

5.4 AFIŜOJ KAJ STRATRUBANDOJ: Depende de la financaj eblecoj, ili estas tre utilaj por veki intereson de la publiko kaj eviti la anonimecon de nia manifestacio. Ili prefere estu en portugala lingvo kaj servu ankaŭ por klare indiki la kongresejon.

5.5 DUMKONGRESA FOTO-SERVO: Kutime, la plimulto de la kongresanoj ŝatas mem foti la kongresajn eventojn. Tamen, se LKK organizas foto-servon, zorgu ke ĝi estu je moderaj prezoj kaj ne donu la rajton ekspluati nin al iu fremda firmo.

5.6 KONGRESA LIBRO: Ĝin ricevu ĉiuj kongresanoj kaj eventualaj invititoj. Depende de la lokaj eblecoj por eldoni ĝin per pagitaj anoncoj de bankoj - hoteloj - restoracioj -butikoj - k.s., la Kongresa Libro povas esti pli ampleksa ol simpla listo de programeroj kaj nomo de aliĝintoj. Ĝi povus ekzemple enhavi resumon de la ĉefaj prelegoj, informon pri la urbo (precipe se la urbaj turismaj instancoj ne mem eldonas prospekton en Esperanto, liston de komercaj entreprenoj, kiuj donas specialan rabaton al la kongresanoj, ktp., ktp.

5.7 KONGRESA INSIGNO: Ĝi povas esti pli aŭ mal pli belaspekta, depende de la lokaj cirkonstancoj. Gravas tamen, ke ĝi surhavu la nomon de la kongresano en kiel eble plej dikaj literoj.

5.8 TABULOJ EN LA KONGRESA HALO: LKK starigu almenaŭ tri tabulojn:
-Rendevua tabulo: utila precipe se la kongreso estas multenombra. Necesas tamen la kunlaboro de taŭgaj deĵorantoj;
-Anonc-Tabulo: utila por diskonigi program-ŝanĝojn, detalojn pri ekskursoj, perditajn kaj trovitajn objektojn, personajn anoncojn, ktp.
-Gazetara Tabulo: por ekspozicii artikolojn pri la kongreso aperintaj en la loka kaj nacia gazetaro.

5.9 GIĈETOJ KAJ VENDADO DE OBJEKTOJ: Principe LKK zorgu, ke la kongresa halo ne transformigu en liberan foiron, sen ia rilato al la celoj de la kongreso. Vendado de libroj kaj objektoj okazu en la kadro de la Libroservo per aparta interkonsento kun BEL. Starigo de

giĉetoj por diversaj celoj komercaj kaj pri-movadaj okazu interkonsente kun LKK kiu difinos la koncernajn kostojn depende, ĉu la kongresejo estas senpaga aŭ ne.